

Ekonomiaj aspektoj de la lingva malegaleco



Áron Lukács

Konsultanto: D-ro Gergely Kovács
Altlernejo por Modernaj Negocaj-Komercaj Studoj
(College for Modern Business Studies)
Tatabánya, Hungario 2007

Enhavo

Resumo	3
Enkonduko	4
I. La kostoj de lingvolernado	6
1. La rektaj kostoj de lingvolernado	6
2. La alternativaj kostoj de lingvolernado	10
II. La kostoj de la informperdoj pro komunikadaj malfacilaĵoj	11
III. Kromaj kostoj por la socio kaj la ekonomio	13
IV. Malavantaĝoj por tiuj, kiuj ne parolas la koncernan lingvon kiel gepatran	14
V. Konkurenca avantaĝo de Unuiĝinta Reĝlando en la Eŭropa Unio	
pro la lingva malegaleco	15
1. La rektaj kostoj de lingvolernado	18
2. La alternativaj kostoj de lingvolernado	18
3. Kostoj rezultantaj el aliaj faktoroj	18
4. Sintezo	19
VI. Sugestoj por mildigi la problemon	20
Bibliografio	21

Resumo

La agadoj de la membrolandoj kaj de la Eŭropa Unio (EU) mem estu „farataj respekte al la principo de merkata ekonomio, en kiu la konkurencado estas libera” (Artikolo 4 de la Traktato fondanta Eŭropan Komunumon, firmigita versio).

Ĉi tiu studo priskribas la praktikan aplikon de tiu fundamenta principo de EU en la kampo de la uzado de la lingvoj.

La konkludo de ĉi tiu studo estas, ke en la aktuala situacio la lingvo-uzado en la Eŭropa Unio distordas la merkaton kaj konsiderinde malhelpas la liberan konkurencadon en la ekonomio. Je mallonga daŭro tio favorigas la civitanojn kaj entreprenojn de iuj membrolandoj de EU, sed malfavorigas la civitanojn kaj entreprenojn de la plejmulto el la ceteraj membrolandoj. Je longa daŭro tio estigas baron al pli efika ekonomia disvolviĝo de la tuta EU.

La lingvolernado en EU kostas proksimume 60 miliardojn da eŭroj jare. Tiu sumo ne inkludas la kostojn de la vojaĝoj kaj restadoj en aliaj landoj por lerni lingvon. Sole por la personoj vojaĝantaj al Britio tiucele la sumo atingas proksimume 13 miliardojn da eŭroj jare. Se oni ankaŭ konsideras la tempon pasigitan por lerni lingvon kaj transkalkulas tiun tempon en monon (surbaze de la averaĝa laborkosto en EU), oni ricevas entutan sumon de 210 miliardoj da eŭroj elspezataj jare.

La kostoj de tradukado kaj interpretado estas multe malpli altaj, sed ne neglekteblaj: proksimume 6 miliardoj da eŭroj jare. Pliaj faktoroj estas enkalkulendaj, sed ili estas malfacile kvantigeblaj. Tiaj estas ekzemple la informperdoj pro la lingvaj problemoj kaj la malfacilaĵoj spertataj de partoprenantoj en la ekonomia kunlaboro, kiuj ne parolas la donitan lingvon. Laŭ maldetala takso, la kosto de tiuj faktoroj superas 70 miliardojn da eŭroj jare.

Oni tiel alvenas al entuta sumo de proksimume 350 miliardoj da eŭroj jare, kio estas pli ol 3% de la malneta interna produkto (MIP) de EU (en la jaro 2005).

Tamen la plej grava problemo verŝajne ne situas en la sumo mem, sed en la distribuo de tiu sumo. Estas precipe Britio, kiu rikoltas la profitojn de tiu situacio, dum la plejmulto de la ceteraj landoj perdas monon. Laŭ la taksoj de ĉi tiu studo pro la lingva malegaleco ĉiuj civitanoj de la aliaj membrolandoj de EU ĉiujare pagas proksimume 900 eŭrojn al Britio. Tiu procezo daŭras jam dum multaj jaroj, pro kio ĉi tiu sumo akumuliĝas. Supozante 20-jaran periodon kaj 10%-an interezon jare, ĉi tiu sumo atingas proksimume 55 000 eŭrojn por kapo.

Enkonduko

Ĉi tiu studo esploras, laŭ kiu grado konformas la aktuala lingva situacio de EU al la principoj de merkata ekonomio kaj al la postuloj de justa merkata konkurenco.

La fonda Traktato de Eŭropa Komunumo (en la sekvaj: la Traktato) deklaras (1):

„Artikolo 4.

1. Por plenumi la celojn menciitajn en artikolo 2, la agadoj de la membrolandoj kaj la Komunumo enhavu, laŭ la kondiĉoj kaj laŭ la tempumo preskribitaj de la nuna traktato, la instalon de ekonomia politiko bazita sur la intima kunordigo de la ekonomiaj politikoj de la membrolandoj pri la interna merkato kaj pri la difino de komunaj celoj, kaj realigita konforme al la principo de malferma merkata ekonomio, en kiu la konkurenco estas libera.” (emfazo de la aŭtoro)

La Traktato krome detaligas, kiujn devigojn respektu la membroŝtatoj por ebligi **„malferman merkatan ekonomion, en kiu la konkurenco estas libera”**. Laŭ tiuj devigoj la membroŝtatoj ne rajtas interveni por distordi la merkatan konkurencon aŭ maljuste favorigi iujn sektorojn de la ekonomio, iujn entreprenojn aŭ la tutan membrolandon.

Indas fari klarigan noton pri la signifo de la konkurencpovo de la unuopaj landoj. Kvankam kelkaj aŭtoroj asertas, ke la konkurencpovo ne estas difinebla por tuta lando, sed nur por entreprenoj aŭ entreprenaroj, tiun vidpunkton kontestas multaj aliaj aŭtoroj, inter kiuj estas ankaŭ mi. Mi opinias, ke pravas tiuj, kiuj konsideras, ke la konkurencpovo ekzistas ankaŭ je landa nivelo. Ekzemple la Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluigo difinas tiun nocion jene:

„La grado, laŭ kiu iu lando kapablas produkti varojn kaj servojn, kiuj plenumas la postulojn de la internacia merkato en kondiĉoj de la libera merkato kaj ne distordita konkurenco, kaj dume konservante kaj pliigante la realajn enspezojn de la loĝantaro je longa daŭro.” (2)

Alia respektinda internacia institucio, la Tutmonda Ekonomia Forumo bazita en Svislando regule publikigas statistikojn montrantajn la konkurencpovon de ĉiu lando (3).

Koncerne la nunan studon notindas, ke la Traktato aparte zorgas pri la mildigo de la diferencoj en la ekonomia disvolviteco inter la membrolandoj kaj inter la regionoj:

„ Artikolo 158.

Por antaŭenigi harmonian disvolviĝon de la tuta Komunumo, ĉi tiu evoluigu kaj daŭrigu sian agadon celantan plifortigi sian ekonomian kaj socian kuniĝon. La Komunumo aparte

celu malpliigi la malegalecon inter la disvolviĝa nivelo de la diversaj regionoj kaj la postreston de la malplej favoritaj regionoj aŭ insuloj, inkluzive la kamparajn areojn.”

Atente al la ĉi-supraj reguloj de EU, necesas esplori, kigrade la komunikadaj malfacilaĵoj influas la konkurencpovon de la membrolandoj de la Eŭropa Unio, kigrade tiuj distordas la merkaton, kaj kiel ili profitigas la ekonomion de iuj landoj kaj malprofitigas aliajn. Ne necesas aparte atenti la efikojn, se la malavantaĝo kaŭzata de la komunikadaj malfacilaĵoj estas sensignifa. (Eble eĉ en tiu okazo la kulturaj aŭ aliaj elementoj pledus favore al iuj reformoj, sed tio ne estas la temo de ĉi tiu studo.) Tamen se la komunikadaj malfacilaĵoj signife distordas la merkaton, tiam nepre necesus fari urĝajn paŝojn por efektiviigi la preskribojn de la Traktato.



I. La kostoj de la lingvolernado

La lingvolernado estigas multajn kostojn, kiujn oni povas klasifiki en du grandajn grupojn:

1. La rektaj kostoj de la lingvolernado
2. La alternativaj kostoj de lingvolernado

1. La rektaj kostoj de la lingvolernado

En ĉi tiu ĉapitro mi analizas la unujarajn kostojn pagatajn de la ŝtato kaj individuoj por lerni fremdajn lingvojn en Hungario kaj en Eŭropa Unio .

Diversaj studoj pravas, ke persono kun averaĝa lernokapablo bezonas proksimume 2000 horojn por regi sian unuan fremdan lingvon je grado, kiu ebligas uzi ĝin por altnivelaj konversacioj, aŭ praktiki ĝin je nivelo sufiĉa en profesia medio. Tamen tiu scipovo de fremda lingvo eĉ post tiuj studoj malsuperas la gepatralingvan nivelon, kaj malavantaĝas la nedenskulon. Tiu temo estos plu diskutata en la ĉapitro „**Malavantaĝoj por tiuj, kiuj ne parolas la koncernan lingvon kiel gepatran**”.

La daŭro de 2000 horoj menciita ĉi-supre respondas precize al unu laborjaro. La alproprigo de la dua fremda lingvo necesigas ĝenerale 20%-jn malpli da tempo ol la lernado de la unua, do tio rezultigas 1600 horojn.

Rektaj lingvolernadaj kostoj por individuo (aĉeto de lernolibroj, kajeroj ktp.) ĝenerale ekzistas, eĉ se la ŝtato financas la instruadon, tamen kompare al la sumoj elspezataj de la ŝtato, tiuj kostoj restas relative malaltaj.

Laŭ studo farita en Svislando la kostoj de fremdlingva instruado konstituas 10%-jn de la entuta kleriga kosto. Tiu studo asertas, ke ĉi tiu pli-malpli samas en ĉiuj eŭropaj landoj (la elspezoj varias inter 5 kaj 15%) (4).

Laŭ la Hungara Statistika Oficejo, KSH (5), la **ŝtataj** elspezoj por publika klerigado atingis 1170 miliardojn da forintoj (mallonge: HUF) en 2005. La 30an de septembro 2008 unu eŭro valoris 243 HUF laŭ la retejo de la Hungara Nacia Banko. La datumbazo de KSH enhavas ankaŭ la sumon, kiun unu persono averaĝe elspezas dum jaro por lernado. (6) Tiu sumo en 2005 estis 5418 HUF. Tiun sumon oni pagas el la neta enspezo (post impostpago). Sekve indas konsideri ankaŭ la imposton sur salajro kaj la kontribuon por la sociala asekuro. Tiuj impostoj kaj kontribuoj konstituas averaĝe sumon samvaloran kiel la neta salajro. La elspezojn por la lernado plejparte pagas personoj ekonomie aktivaj (la pensiuloj

p



agas relative malmulte), tial tiujn 5418 HUF oni devas obligi almenaŭ per 1,7 (temas pri kruda takso, enkalkulinte ankoraŭ aliajn faktorojn). Sekve, en 2005 la averaĝa kontribuo de individuo por financi la lernadon estis 9210 HUF. Konsiderante la 10 milionojn da loĝantoj, oni rajtas konkludi, ke la loĝantaro rekte elspezas 100 miliardojn da HUF por la kleriĝado.

Tiel la totala sumo elspezita por la klerigado atingis 1300 miliardojn da HUF. 10% el tiu sumo egalas al 130 miliardoj da HUF. (Parenteze, inter la elspezoj de individuo por ĝenerala lernado, la proporcio elspezata por la lernado de lingvoj evidente estas pli granda ol ĉe la registaraj elspezoj, sed konsiderante, ke la kostoj persone kontribuataj estas relative malgrandaj kompare al la entuta kosto, ni uzos ĉi tie la nombron de 10% por simpligi.) En 2005 la MIP de Hungario estis 22 000 miliardoj da HUF, do 130 miliardoj da HUF reprezentas 0,6%-n de la MIP!

Tabelo 1 prezentas la proporciojn kaj la sumojn de la publikaj elspezoj por la instruado en la Eŭropa Unio en la jaro 2003 (la nombroj en la lasta kolumno estas la rezultoj de miaj kalkuloj) (7).

Tabelo 1: Registraraj elspezoj por la instruado kaj la lingvoinstruado

	Registraraj elspezoj por instruado (miliardoj da eŭroj laŭ aĉetpovo)	Registraraj elspezoj por instruado (en procentoj de la MIP)	Privatulaj elspezoj por lernado (en procentoj de la MIP)	Elspezoj por lingvolernado (miliardoj da eŭroj laŭ aĉetpovo)
EU-25	515,6	4,9	0,6	57,873
EU-15	470,5	4,9	0,6	52,811
Eŭro-regiono	364,1	4,8	0,6	40,961
Aŭstrio	11,7	5,2	0,3	1,238
Belgio	16,1	5,8	0,4	1,721
Ĉeĥio	6,8	4,3	0,4	0,743
Danio	11,7	6,7	0,3	1,222
Estonio	0,8	5,3	:	0,080
Finnlando	8,2	6,0	0,1	0,834
Francio	88,5	5,7	0,6	9,782
Germanio	91,5	4,4	0,9	11,022
Grekio	8,2	3,9	0,2	0,862
Hispanio	38,2	4,2	0,5	4,275
Hungario	7,8	5,5	0,6	0,865
Irlando	5,1	4,1	0,3	0,547
Italio	64,1	4,5	0,4	6,980
Kipro	0,9	6,5	1,4	0,109
Latvio	1,1	4,9	0,8	0,128
Litovio	1,8	4,8	0,5	0,199
Luksemburgio	0,9	4,0	:	0,090
Malto	0,3	4,4	1,4	0,040
Nederlando	22,3	4,5	0,5	2,478
Pollando	21,9	5,6	0,7	2,464
Portugalio	9,3	5,5	0,1	0,947
Slovenio	2,0	5,4	0,9	0,233
Slovakio	2,6	4,3	0,5	0,290
Svedio	16,8	6,6	0,2	1,731
Unuiĝinta Reĝl.	77,8	5,1	1,0	9,305

Fonto: Aldonaĵo al la jarlibro GFS 2002

La malneta interna produkto (MIP) de la Eŭropa Unio (EU-25) estis 10 817 miliardoj da eŭroj en 2005 (1), kio signifas, ke en tiu jaro la membrolandoj de la Komunumo elspezis 60 miliardojn da eŭroj por la lernado de fremdaj lingvoj,

Tamen ĉi tio tute ne estas la plej granda elspezo! La alternativaj kostoj de lingvolernado estas multe pli altaj. Tamen antaŭ ol demonstri tion, mi mencias kelkajn aliajn elementojn koncerne la rektajn kostojn.

Unue, la ĉi-supraj sumoj ne enhavas la kostojn, kiujn oni devas pagi por vojaĝoj kaj restado en fremda lando por lerni fremdan lingvon. Laŭ la datumoj de Unuiĝinta Reĝlando koncerne lingvolernadon, oni povas konkludi jene:

- Ĉiujare 800 milionoj da britaj pundoj estas elspezitaj por eldonaĵoj rilatantaj al la lernado de la angla lingvo.
- Ĉiujare 700 000 personoj veturas en Britio por tie lerni la anglan.
- En 2005 tiuj personoj rekte elspezis proksimume 2,6 miliardojn da eŭroj en Britio. Tamen, laŭ Phillipson (9), Unuiĝinta Reĝlando ĉiujare enspezas 13 miliardojn da eŭroj danke al la lernado de la angla. Laŭ Grin (10), en 2004 tiu sumo estis 15 miliardoj da eŭroj, kiu kune kun la interezoj, faras 17,4 miliardojn. Ekzistas granda diferenco inter tiuj du nombroj, sed eblas, ke la multobliga efiko ludas rolon. Tiu fenomeno estas observebla ekzemple por investoj en infrastrukturojn.

Resumante la rezultojn de la ĉi-supraj kalkuladoj oni rajtas krude taksi, ke la tuto de la rektaj kostoj de lingvolernado en la Eŭropa Unio superas 70 miliardojn da eŭroj jare.

En la sekva parto ni ekzamenos la alternativajn kostojn de lingvolernado kaj notas la proporcion inter tiuj ĉi kaj la ĵus menciitaj rektaj kostoj.

2. La alternativaj kostoj de lingvolernado

La alternativaj kostoj de lingvolernado signifas la utilon rezulte de tiuj aliaj eblaj agadoj aŭ realigaĵoj, kiuj povus esti faritaj dum la tempo pasigata per lingvolernado.

Se oni konsideras unu laborjaron tempon, ni rajtas diri, ke tiuj, kiuj lernis fremdan lingvon, komencas labori unu jaron pli malfrue kompare al tiuj, kiuj ne lernis fremdan lingvon. Tio signifas ne nur perdon de enspezo por ili, sed ankaŭ malplian plenumaĵon de la nacia ekonomio. Tio signifas ankaŭ malplian jaron da impostkolekto por la ŝtato. Tiel la socio devas subvencii la bezonojn de ĉiu generacio dum plia jaro. (Certe, la scipovo de lingvoj havas ankaŭ financajn avantaĝojn, sed tio ne koncernas la ĉeftemon de tiu ĉi studo.)

Se oni ekkalkulas elirante el la averaĝa neta salajro (laŭ KSH tio estis 104 000 HUF en 2005), la sumo perdita egalas $12 \times 104\,000 = 1\,248\,000$ HUF en unu jaro por ĉiu salajrulo. Plue, mankos el la ŝtata buĝeto ankaŭ la enspezo de impostoj kaj social-asekuraj kontribuoj. Ĉi-lastaj egalas proksimume al la sumo de la neta salajro.

KSH informas nin ankaŭ pri tio, ke en 2005 la nombro de laboruloj en Hungario estis 4,2 milionoj. Do la entuta sumo de la salajrokosto inkluzive la impostojn kaj social-asekuraj kontribuojn estis $1\,248\,000 \times 4\,200\,000 = 5\,242$ miliardoj da HUF por la nacia ekonomio. Se oni kalkulas averaĝe per kvardek-jara laboraktiveco, la perdo egalas al $1/40$ de tiu sumo jare, do 131 miliardoj da HUF (ĉiujare unu kvardekono de la entuta sumo elspezita dum 40 jaroj). Ĉi tio ankaŭ egalas al 0,6% de la MIP.

Laŭ Eurostat en 2005 en la tuta Eŭropa Unio (EU-25) la averaĝa laborkosto estis 21,2 eŭroj hore. La proporcio de la salajruloj estis 63,8% de la loĝantaro inter la 15a kaj 64a jaraĝo. (Ĉi-lastaj grupo konsistigas 67,2%-jn de la tuta loĝantaro, do 308,8 milionojn da personoj, la tuta loĝantaro de EU estante 459,5 milionoj da homoj.) Tio signifas, ke la entuta nombro de salajruloj egalas 198 milionojn. Obligata per la nombro de horoj kalkulitaj ĉi-supre, kaj kalkulante per 2000 laborhoroj jare, tio rezultigas $21,2 \times 2000 \times 198\,000\,000 = 8\,395$ miliardoj da eŭroj. Dividante per 40, oni alvenas al 210 miliardoj da eŭroj. Tio do estas la jara alternativa kosto de lingvolernado. Tio egalas la trioblon de la rekta kosto de lingvolernado!

Ni rimarkigu, ke la ĵus menciitaj ciferoj validas por la lernado de unusola fremda lingvo. Kompreneble, kiam pluraj fremdaj lingvoj estas lernataj, la elspezoj plimultiĝas. Aliflanke ekzistas sendube granda nombro da personoj, kiuj neniam (el)lernis fremdan lingvon, kaj pro tiu kialo la menciita sumo reale malpli altas. Mi tamen opinias, ke en la hodiaŭa mondo nepre necesas lerni fremdajn lingvojn, kaj frue aŭ malfrue ĉiu devos fari tion.

Ni aldonu ankaŭ tion, ke ĉi tiu problemaro (same kiel la kostoj) esence koncernas personojn, kies gepatra lingvo ne estas la angla. La denaskaj anglalingvanoj estas ege favorataj en EU. Ni poste detale pritraktos tion.

II. Kostoj de la informperdoj pro lingvaj malfacilaĵoj

La perdo de informoj estas unu el la plej gravaj problemoj. Ĝi estas konstatata ĉe multaj diversaj okazoj. Tio malfavoras precipe la personojn, kiuj ne povas komunikadi en la angla lingvo.

La interpretado estas informotransigo, dum kiu signifa parto de la informoj perdiĝas. Ĉi tio validas eĉ tiam, kiam spertaj kaj tre trejnitaĵoj interpretistoj estas dungitaj, kiel en la institucioj de la Eŭropa Unio en Bruselo. Ni povas mencii kiel ekzemplon la renkontiĝojn de la Eŭropa Konsilio, kiuj estas kunvenoj por konsultiĝoj kaj decidofaradoj de la ŝtatestroj kaj registarestroj de la membrolandoj. Dum tiuj renkontiĝoj la reprezentantoj de ĉiu lando parolas sian gepatran lingvon. Eĉ dum la kunsidoj de laborgrupoj konsistantaj el ekspertoj, la partoprenantoj ofte parolas sian propran lingvon. En tiuj cirkonstancoj la parolantoj de la angla lingvo estas ege favorataj pro du kialoj.

Unuflanke, ĉar praktike ĉiuj partoprenantoj komprenas la anglan, ili povas kompreni la britiajn reprezentantojn sen interpretado, dum por kompreni la reprezentantojn de aliaj landoj ili devas aŭskulti “trian” personon, la interpretiston. La spertoj montras, ke pro tiu kaŭzo la intervenoj de ne-britaj partoprenantoj estas ofte nekompreneblaj por la aliaj. Tre ofte la ekspertoj devas klarigi al ne denaske anglalingvaj ekspertoj, pri kio la preleginto estis parolanta (ekzemple la estro de iu lando, kies alparolo estas interpretata en la lingvon de la aliaj partoprenantoj). Sekve de ĉio ĉi la britoj ĝuas grandegan avantaĝon dum la debatoj, ĉar ili pli facile komprenigas sin, kaj pro tio ili kaj kapablas pli facile altrudi sian vidpunkton.

Aliflanke, en la EU-aj institucioj ne eblas interpreti rekte en ĉiujn lingvojn pro la alta nombro de idiomoj. En la kazo de 25 lingvoj necesus $25 \times 24 = 600$ diversaj kombinoj. Cetere ekzistas regulo en la uniaj institucioj, laŭ kiu interpretisto rajtas interpreti nur al sia gepatra lingvo. Tamen ne eblas dungi tiom da interpretistoj, kiom necesus por obei ĉi tiun regulon. Eĉ se oni povus financi tiom da interpretistojn kaj teknike ebligi tiom da interpretadojn, oni apenaŭ trovus fakulojn tiucele, ĉar tiuokaze dum ĉiu kunsido de la Konsilio (tio estas kunsido

de la ĉefministroj, ministroj pri financoj, ministroj pri transporto ktp.) necesus havi interpretistojn parolantajn ekzemple la hungaran kiel gepatran por interpreti el la dana, latva, litova, estona, portugala kaj aliaj lingvoj de EU en la hungaran.

Por eviti tiun grandegan problemon la paroladoj unue estas interpretataj en perantan lingvon – preskaŭ ĉiam en la anglan –, kaj sekve ili estas interpretataj el tiu peranta lingvo en aliajn lingvojn. La duobla interpretado rezultigas pluroblan informoperdon. Multnombraj praktikaj spertoj pravas, ke eraroj multnombras dum interpretadoj kaj tradukadoj, kaj tiuj eraroj kreskas eksponente dum sinsekvaj tradukoj. (Tion eminente karakterizis la fama hungara verkisto kaj poeto Frigyes Karinthy en sia humura verko titolita *Műfordítás* („Poemtraduko”): li plurfoje tradukis poemon el la hungara en la germanan kaj inverse: fine la signifo de la poemo komplete ŝanĝiĝis.)

Por personoj, entreprenoj kaj aliaj institucioj multe kostas ankaŭ tio, se ili sin direktas al la instancoj de Eŭropa Unio en lingvo alia ol la angla (aŭ eble la franca). Teorie estas permesate sin turni al uniaj instancoj en la oficiala lingvo de ajna membrolando. Praktike tamen, se iu skribas leteron al tiuj instancoj en lingvo alia ol la angla aŭ la franca, la taskito pri la afero kutime ne komprenas pri kio temas, ĉar li ne konas la koncernan lingvon. Ĉar la oficiala traduko de tia korespondaĵo bezonas multan tempon, la administranto ĝenerale unue serĉas kolegon scipovanta la lingvon, en kiu la letero estis verkita, por akiri maldetalan informon pri la enhavo. Unuflanke tio bremsas ĉiun en sia propra laboro – tio estas unu el la kialoj, pro kiuj la administrantoj ne ŝatas tian korespondaĵon –, aliflanke denove perdiĝas gravaj informoj. El ĉio ĉi rezultas plua malavantaĝo: la sendinto de la korespondaĵo ricevas respondon multe pli malfrue ol se li estus skribinta la leteron angle.

La informperdoj okazas ne nur tiukampe. Komunikadon inter kaj ankaŭ ene de entreprenoj, esplorinstitucioj ktp. ofte malhelpas la uzado de pluraj lingvoj. Tio okazas diversmaniere: ekzemple oni ne sukcesas ĝustatempe sendi informon taŭgan al partnero; dum komercaj pritraktadoj, konferencoj kaj aliaj kunvenoj la partoprenantoj ne scipovantaj iun lingvon havas malavantaĝon; tiuj, kiuj ne konas la anglan, ĝenerale malfacile komprenas la normojn de industria sektoro, kiuj ĉefe atingeblas en la angla lingvo. Ĉio ĉi kostas multon por la nacia ekonomio de la plejmulto de la landoj.

III. Kromaj kostoj por la socio kaj la ekonomio

En la plimulto de la landoj la diversaj organizoj kaj entreprenoj elspezas grandan monsumon por kapabli komuniki en fremdaj lingvoj (ĉefe en la angla). Ili tradukas siajn publikaĵojn en la anglan. En ilia interretejo ili disponigas informojn ankaŭ en fremdaj lingvoj, ĝenerale en la angla (kelkfoje ili aperigas nur la plej gravaj informoj, sed ofte ili praktike duobligas sian retejon). Ankaŭ allogi kaj gardi ĉe si negocistojn parolantajn plurajn fremdajn lingvojn postulas multan monon.

La sumo elspezata por la interpretado kaj tradukado estas taksata je proksimume 5 miliardoj da eŭroj en la Eŭropa Unio 15-opa (11). Sekve de la plivastigo de EU en 2004, la loĝantaro de la Unio kreskis per 19,3%, sed la MIP de la novaj membrolandoj egalas nur al proksimume 50% de tiu de la malnovaj membrolandoj. Surbaze de tio oni povas dedukti, ke la merkato kreskis per 10%. Tiel en EU-25 la sumo elspezata por la tradukado kaj interpretado atingis 5,5 miliardoj da eŭroj en 2004 (12).

Okaze de egala distribuo ĉiu lando devus kundividi la kostojn de la lingva komunikado laŭ la proporcio, kiun reprezentas ĝia loĝantaro en Eŭropa Unio. En Figuro 1 videblas, ke la loĝantaro de Britio reprezentas 13%-jn de tiu de la tuta EU. En Figuro 2 oni povas observi, ke koncerne la internacian lingvan komunikadon la rilatumo estas tute malsama, ĉar laŭ la Eŭropa Komisiono la proporcio de la angla lingvo atingas 50 procentojn!




Fig. 1




Fig. 2

Do, se oni konsideras la distribuon de la loĝantaro, la komunikado al la angla aŭ el la angla lingvo devus egali al 13% de la kostoj, tio estas 0,72 miliardoj da eŭroj. Tamen la kosto atingas nun 2,76 miliardojn da eŭroj, kio estas ties kvaroblo! La membrolandoj pagas do proksimume kromajn 2 miliardojn da eŭroj nur por komuniki pere de la angla lingvo.

Tiu lingva monopolo donas kromajn avantaĝojn al tiuj, kiuj parolas la „regantan” lingvon. La parolantoj de tiu lingvo povas proponi pli da servoj ol aliaj (tiaj servoj estas ekzemple la instruado, la interpretado, la tradukado, la reviziado aŭ la publikigado de tekstoj en sia lingvo, liverado kaj eksportado de instru-materialoj). Esplorante la publikaĵojn kaj interretejojn de Britio oni apenaŭ trovas lingvojn krom la angla, dum en aliaj landoj ĉiu grava entrepreno aŭ organizo havas siajn informmaterialojn kaj retejon ankaŭ en la angla lingvo.

IV. Malavantaĝoj por tiuj, kiuj ne parolas la koncernan lingvon kiel gepatran

La malavantaĝoj por tiuj, kiuj ne parolas la lingvon de la komunikado kiel gepatran lingvon, estas tre diversaj kaj malfacile takseblaj kaŭze de la multiplika efiko. Eĉ se iu estas pli bona sia profesio, lia maleblo komuniki je la nivelo de denaska parolanto povas konduki al malpromociiĝo.

Ekxa hungara ŝtata stipendiulo, kiu pasigis jaron eksterlande kaj diplomiĝis kun distingo en ekonomio, rakontis al mi jenan instruon historion:

„Ĉi tie en Hungario, se ni laboras kun denaska anglalingvano, ni devas adaptiĝi al li. Ekzemple en nia entrepreno laboras brita kolego, kiu ne parolas la hungaran, kaj kaŭze de li ĉiu devas paroli la anglan. Kia ajn estas la temo, pri kiu ni parolas, ni devas fari tion en la angla. Dum ajna rezonado la argumentoj de la brita kolego ĉiam estas pli bone esprimitaj ol niaj argumentoj defendataj en la angla kiel fremda lingvo. Se ni povus rezoni en la hungara, la rezulto ofte estus malsama!”

Laŭ li aliaj ekscesaj favoroj rezultas el la sola fakto, ke iu parolas la anglan kiel gepatran lingvon:

„Ni sekvas anglalingvajn aŭdajn prezentaĵojn, el kiuj ni devas akiri informojn koncerne industriajn sektorojn, produktojn ktp. Ĉiu senescepte devas ekzameniĝi el tio! Ĉiu, escepte de la brito, kaŭze de lia gepatra lingvo! Ofte iujn aferojn li ne scias kaj demandas al ni. Kial li ne devus pasi la ekzamenon? La prezentaĵoj ja okazas en la angla...”

Evidente tio ne estas ununura situacio koncernanta unu entreprenon. Alia parto de lia atestaĵo priskribas la situacion de la laboruloj malpli bone regantaj la anglan:

„Dum kunsido ekzemple, se iu ne bone parolas la anglan, li ne kuraĝas alparoli, sed se la konversacio estus en la hungara, la sama persono verŝajne ja partoprenus la diskuton. Tio ne estas eĉ imagebla, ke nur li parolu en la hungara dum la kunsido.”

Notindas, ke la denaskaj anglalingvanoj ricevas pli altan salajron ol hungaroj, por ke valoru la penon por ili labori en Hungario, dum ili ĝenerale laboras malpli multe kaj havas malpli da entuziasmo ol la hungaraj laboruloj.

Menciindas ankaŭ la malavantaĝo pro la laborjaro mankanta pro la lingvolernado. Dum alia persono lernas fremdan lingvon, la denaska anglalingvano povas uzi tiun tempon por pliboniĝi en sia profesio aŭ en aliaj kampoj, ĝuante tiel maljustan konkurencon avantaĝon super aliaj.

V. Konkurenca avantaĝo de Unuiĝinta Reĝlando en la Eŭropa Unio pro la lingva malegaleco

Estas ĝenerale konate, ke la superrego de la uzado de la angla lingvo estas vere tre granda en la internaciaj rilatoj ene de la Eŭropa Unio. En la aliaj membrolandoj la instruado de la angla kiel fremda lingvo pliiĝas kaj, kiel montrite en tabelo 2, la nombro de junaj personoj parolantaj angle kreskas eĉ pli rapide ol averaĝe en la loĝantaro.

Tabelo 2: Scipovo de la angla en la EUaj membrolandoj laŭ aĝogrupoj en 2000 (en procentoj)

Lando	Aĝo						
	15-25	26-44	45-64	65+	Plej granda diferenco inter la aĝogrupoj esploritaj	Diferenco inter la grupo aĝanta 15-25 jarojn kaj tiu aĝanta 26-44 jarojn	La tuta lando
Germanio (okcidenta)	54,8	40,4	32,3	13,8	41,0	14,4	34,6
Germanio (orienta)	47,7	22,5	10,9	4,0	43,7	25,2	18,6
Aŭstrio	50,9	33,6	18,6	10,2	40,7	17,3	29,4
Belgio	49,5	33,8	24,7	8,7	40,8	15,7	29,5
Danio	74,4	66,2	50,2	31,3	43,1	8,2	56,1
Hispanio	29,8	18,7	6,0	1,3	28,5	11,1	15,3
Finlando	59,6	47,4	21,3	6,2	53,4	12,2	36,9
Francio	42,0	28,7	15,2	5,4	36,6	13,3	24,4
Grekio	67,3	36,9	12,0	4,9	62,4	30,4	29,4
Italio	45,3	26,9	7,8	2,3	43,0	18,4	21,5
Luksemburgio	46,2	43,5	36,0	32,5	13,7	2,7	40,3
Nederlando	76,0	73,2	53,0	38,1	37,9	2,8	63,7
Portugaliao	42,6	24,9	9,7	2,3	40,3	17,7	21,3
Svedio	93,1	86,9	72,5	55,1	38,0	6,2	78,3
EU-15 *	40,2	30,3	18,5	8,5	31,7	9,9	24,6

* Inkluzive Unuiĝintan Reĝlandon kaj Irlandon (*Fonto: Eurobaromètre*)

Tabelo 3: La tri plej ofte uzataj fremdaj lingvoj en ĉiu membrolando kaj kandidata ŝtato de Eŭropa Unio en 2005 (fonto: Eurobaromètre)

Belgio		Ĉeĥio		Danio	
Angla	52%	Germana	31%	Angla	83%
Franca	44%	Angla	24%	Germana	54%
Germana	25%	Rusa	19%	Sveda	19%
Germanio		Estonio		Grekio	
Angla	51%	Rusa	62%	Angla	44%
Franca	12%	Angla	41%	Franca/Germana	8%
Germana	7%	Finna/Germana	18%	Italia	3%
Hispanio		Francio		Irlando	
Angla	20%	Angla	34%	Gaela	21%
Hispana	9%	Hispana	10%	Franca	19%
Franca	8%	Germana	7%	Angla	6%
Italio		Kipro		Latvio	
Angla	29%	Angla	71%	Rusa	67%
Franca	11%	Franca	11%	Angla	34%
Germana/Hispana	4%	Germana/Itala	3%	Latva	24%
Litovio		Luksemburgio		Hungario	
Rusa	79%	Franca	90%	Germana/Angla	16%
Angla	26%	Germana	84%	Rusa/Aliaj	2%
Pola	17%	Angla	66%	Pluraj lingvoj	1%
Malto		Nederlando		Aŭstrio	
Angla	89%	Angla	87%	Angla	53%
Itala	60%	Germana	66%	Franca	11%
Franca	17%	Franca	24%	Itala/Aliaj	8%
Pollando		Portugalio		Slovenio	
Angla	25%	Angla	26%	Kroata	61%
Rusa	24%	Franca	20%	Angla	56%
Germana	19%	Hispana	10%	Germana	45%
Slovakio		Finnlando		Svedio	
Ĉeĥa	31%	Angla	60%	Angla	85%
Germana	28%	Sveda	38%	Germana	28%
Rusa	25%	Germana	17%	Franca/Norvega	10%
Unuiĝinta Reĝlando					
Franca	14%				
Angla	7%				
Germana	6%				
Bulgario		Kroatio		Rumanio	
Rusa	21%	Angla	43%	Angla	26%
Angla	15%	Germana	33%	Franca	17%
Bulgara	11%	Itala	12%	Aliaj	5%
Turkio		Kipra Turka Komunumo			
Angla	18%	Angla	43%		
Turka	6%	Greka	19%		
Germana	4%	Germana	5%		

Laŭ Tabelo 3, la angla estas la fremda lingvo plej parolata en la EU-aj landoj: de 34% el la loĝantaro. Ĝi multe superas la germanan (12%) kaj la francan (11%). Cetere tiu superrego kreskas de jaro al jaro (13).

Figuro 3 montras, ke la membrolandoj kaj kandidataj landoj, kie la loĝantoj parolas malplej multajn fremdajn lingvojn, estas Britio, Hungario kaj Turkio. Ĉi tio pruvas ankaŭ tion, ke Britio ne elspezas multon por lingvoinstruado, kaj ke la britaj civitanoj ne vere bezonas lerni fremdajn lingvojn. Ŝajnas, ke en la nuna situacio tiuj lastaj atendas de ĉiuj en la aliaj membrolandoj, ke tiuj komprenu ilian lingvon, la anglan.




Fig. 3: La proporcio de la parolantoj de fremdaj lingvoj en la membrolandoj kaj kandidataj landoj de EU en 2005

(fonto: Eurobaromètre)

Pro la supraj kialoj mi esploras kaj sumigas ĉi-sube la konkurencajn avantaĝojn de Unuiĝinta Reĝlando kaj la konkurencajn malavantaĝojn de la ceteraj EU-membrolandoj, rezultantaj pro la superrego de la angla lingvo en la Eŭropa Unio.

1. La rektaj kostoj de lingvolernado

La rektaj elspezoj por lingvolernado atingas 70 miliardojn da eŭroj jare en EU. Tio ĉi inkludas ankaŭ la elspezojn de Unuiĝinta Reĝlando.

Tamen Unuiĝinta Reĝlando estas la lando, en kiu fremdaj lingvoj ne estas ĝenerale instruataj. Nur 3% el la lernejoj instruas fremdajn lingvojn je ĉiuj niveloj al la tuto de la lernantaro, kaj eĉ en ili la instruado ĝenerale okazas dum 20 ĝis 30 minutoj semajne. Laŭ enketo en la tuta lando oni trovis nur tri lernejojn, en kiuj pli ol 50 minutoj semajne estis dediĉitaj al lingvoinstruado. En Unuiĝinta Reĝlando la elspezoj por lingvoinstruado por persono jare atingas 36 eŭrojn laŭ proksimumaj taksoj (14). Kompare kun Francio la britoj ŝparas 100 eŭrojn por persono jare danke al tiu minimumisma lingva instruado. Tio egalas al 6 miliardoj da eŭroj ŝparitaj jare. La entutaj elspezoj por lingva instruado en Britio atingas 2,165 miliardojn da eŭroj kontraŭ 8,235 miliardoj en Francio. Se oni aplikas tiun elspezan proporcion al aliaj membrolandoj, oni deduktas, ke la elspezoj por la lingva instruado en Britio estas minimumaj kompare al la elspezoj en aliaj landoj. Kalkulante per tiuj proporcioj, la malavantaĝo por la aliaj membrolandoj atingas 70 miliardojn da eŭroj jare pro la instruado de lingvoj.

2. La alternativaj kostoj de lingvolernado

En la landoj de EU-25 la alternativaj kostoj de lingvolernado egalas ĉirkaŭ 210 miliardojn da eŭroj. De tiu sumo ni devas subtrahi la elspezojn pro lingvolernado en Unuiĝinta Reĝlando, kiuj pro supre menciitaj kialoj ne estas signifaj.

3. Kostoj rezultantaj el aliaj faktoroj

En ĉi tiu alineo mi rearigas la fenomenojn priskribitajn en ĉapitroj II-IV (la kostoj pro informperdoj rezultantaj el komunikadaj problemoj, aliaj kromkostoj por la socia kaj ekonomia vivo, la malavantaĝoj por la personoj, kiuj ne parolas koncernan lingvon je alta nivelo). Estas ekstreme malfacile kalkuli la malavantaĝojn kaŭzitaĵojn de la kromkostoj rezultantaj el ĉi tiuj „aliaj faktoroj”. La makroekonomiaj datumoj ne uzeblas tiucele, oni do devus apliki la metodon „de malsupre supren”, ekzamenante, kie tiuj kromaj kostoj aperas en la individuaj entreprenoj kaj institucioj, kaj el tiuj informoj ni povus ekscii la elspezojn por la ekonomio en nacia skalo. Tamen la tempo kaj la financaj rimedoj disponeblaj por jena studo malebligas tian vastan esploradon. Verŝajnas, ke la

kostoj de ĉiuj ĉi faktoroj superas la lernokostojn, kaj tial ni certe ne troigas, se ni taksas ilin almenaŭ samgrandaj, t.e. 70 miliardoj da eŭroj.

4. Sintezo

Resumante la 3 gravajn faktorojn priskribitajn ĉi-supre, ni konstatas jenon: la tuta kosto egalas $70+210+70=350$ miliardoj da eŭroj. Do Unuiĝinta Reĝlando havas tioman avantaĝon super la aliaj membrolandoj de la Eŭropa Unio. Tiu monsumo egalas al 3,2% de la MIP de Eŭropa Unio (kiu atingis 10 187 miliardojn da eŭroj en 2005). Tiu sumo nepre enorme influas la konkurencpovon kaj de EU kiel tuto, kaj de ties unuopaj membrolandoj. Tial necesus vere serioze okupiĝi pri tiu problemo.

En 2005 la Eŭropa Unio nombris 460 milionojn da loĝantoj, kaj la loĝantaro de Britio estis 60 milionoj. Se oni ne enkalkulas la britan loĝantaron, la cetero de la EUa loĝantaro nombras 400 milionojn. Se oni dispartigas la 350 miliardojn da eŭroj al tiu loĝantaro de 400 milionoj, oni ricevas koston de 875 eŭroj por persono. Tiel Unuiĝinta Reĝlando ŝuldas al ĉiu civitano de la aliaj membrolandoj tiun sumon jare.

Tiu situacio estas des pli maltrankviliga, ĉar ĝi ekzistas jam delonge. Konsekvence la kostoj de tiu maljusta konkurenca avantaĝo akumuliĝas. Tio kaŭzas eĉ multoblan perdon: oni devas inkluzivi en la totala perdo de enspezoj ankaŭ la interezojn sur la forrestinta enspezo, kaj la ripete perditajn jarojn de la sinsekvaj generacioj.

(Irlando estas sendube ankaŭ kalkulenda inter la profitantoj. Tamen ne estus juste konsideri la situacion en Irlando egala al tiu de Britio, ĉar Irlandon konkeris kaj subpremis Britio, kaj altrudis al ĝi la anglan lingvon. La irlanda lingvo tamen daŭre vivas kaj estas vaste uzata, do estus tre grave konservi kaj subteni la irlandajn kulturon kaj tradiciojn!)

En la ĉi-supraj kalkuloj mi ne traktis la fakton, ke la distordita konkurenco validas ne nur inter Britio kaj la aliaj membrolandoj: ĝi ekzistas tutmonde. Mondaskale tio profitigas unuavice Usonon, kiu grandparte respondecas pri la situacio. Tamen tio devus esti temo de alia studo, ĉar la nuna taksas nur la grandecon de la konkurenc-distordo kaŭzata de la lingva malegaleco ene de la Eŭropa Unio.

VI. Sugestoj por mildigi la problemon

Kiel ĉe ĉiuj sociaj problemoj la unua paŝo al la solvo estas konsciigi la publikon kaj la decidofarantojn pri la situacio, disponigante al ili la necesajn informojn kaj kapabligante ilin agi saĝe kontraŭ la problemoj, kiu ĝis nun estis neglektata.

Aliflanke la Eŭropa Komisiono devas ekzameni la eblojn por mildigi la problemon kaj sekve fari decidojn kiel eble plej baldaŭ, ĉar laŭ la Traktato de la Eŭropa Komunumo, la Eŭropa Komisiono devas garantii la aplikadon de la Traktato.

„Artikolo 211

Por certigi la funkciadon kaj evoluigon de la komuna merkato, la Komisiono:

- certigas la aplikadon de la preskriboj de ĉi tiu Traktato kaj tion, ke la agadoj de la koncernaj institucioj konformu al tiuj preskriboj,*
- formulas rekomendojn kaj faras opiniojn pri la aferoj rilatantaj al ĉi tiu Traktato, se ĉi tiu eksplicite antaŭvidas tion aŭ se la Komisiono konsideras ilin necesaj,*
- havas propran decidopovon kaj partoprenas en la formado de la decidoj de la Konsilio kaj la Eŭropa Parlamento laŭ la kondiĉoj antaŭviditaj en ĉi tiu Traktato,*
- uzas la kompetentecojn, kiujn la Konsilio atribuis al ĝi por la efektivigo de la reguloj, kiujn ĉi-lastaj starigas.”*

Konsidere tiujn ĉi regulojn, estiĝas la demando: Kiam kaj kiel la Eŭropa Komisiono devigos Brition pagi al ĉiuj koncernuloj la sumon rezultantan el la maljusta konkurenca avantaĝo priskribita en ĉi tiu studo?



Bibliografio

1. **Traktato pri la Estigo de la Eŭropaj Komunumoj.** (Ties teksto en la oficialaj lingvoj de EU troveblas en la retejo http://europa.eu/abc/treaties/index_cs.htm.)
2. Flexibility and Competitiveness: Labour Market Flexibility, Innovation and Organisational Performance (Flex-Com) Final Report Participants: Project is funded by the European Commission DG Research in the framework of Contract HPSE-CT-2001-0009 <http://ec.europa.eu/research/social-sciences/pdf/finalreport/98-3068-final-report.pdf>
La originala teksto jenas: „*The degree to which a country can, under free and fair market conditions, produce goods and services which meet the test of international markets, while simultaneously maintaining and expanding the real incomes of its people over the long term*”
3. **Global Competitiveness Report.** World Economic Forum.
<http://www.weforum.org/en/initiatives/gcp/Global%20Competitiveness%20Report/index.htm>
4. Professor François GRIN, **L’enseignement des langues étrangères comme politique publique.** Rapport établi à la demande du Haut Conseil de l’évaluation de l’école, Septembre 2005
5. **Magyar Statisztikai Évkönyv 2005**, KSH, Budapest, 2006
6. **Háztartásstatisztikai Évkönyv 2005.** KSH, Budapest, 2006
7. **Supplement to the 2002 GFS Yearbook**, IMF
8. **Europe in figures.** Eurostat yearbook 2006-07
9. Phillipson, Robert, 2003: **English-Only Europe?** London: Routledge.
10. Professor François GRIN, **L’enseignement des langues étrangères comme politique publique.**
11. ASSIM, 2000 : **Évaluation de l’incidence économique et sociale du multilinguisme en Europe.** Rapport final—Phase 3, Actualisation quantitative.
12. Professor François GRIN, **L’enseignement des langues étrangères comme politique publique.** Rapport établi à la demande du Haut Conseil de l’évaluation de l’école, Septembre 2005 – – La datumoj estas kalkulitaj laŭ ASSIM
13. **Europeans and Languages.** Eurobarometer 2005.
http://ec.europa.eu/public_opinion/archives/ebs/ebs_237.en.pdf
14. Professor François GRIN, **L’enseignement des langues étrangères comme politique publique.**

Dankesprimio

Krom mia Konsultanto mi esprimas dankon ankaŭ al D-rino Katalin Antalóczy pro ŝiaj valoraj rimarkoj.

Mi dankas ankaŭ s-ron Leo De Cooman (Belgio) pro la Esperantigo kaj Esperantistojn el Hungario pro la korektado.

La studo troveblas en pluraj lingvoj en la retejo <http://www.ekolingvo.com>